


Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro

N-ro 201 (2017:1)

Okt – Dec 2016



Literaturo:
Du libroj

Babilado kun...
Katalin Kováts

Vojaĝo:
Rememoroj
aperas...

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Eperantista de Rio-de-Janeiro

N-o 201 (2017:1)

Jan - Mar 2017

76-a jarkolekto

Redaktas: Fernando Pita

Revizias: Túlio Flores

Aranĝas: Allan Argolo

Ĉi-numeraj kunlaborantoj:

Katalin Kováts, Tatjana Loskutova
kaj Paŭlo Sergio Viana


Kovrilo:


Rio Esperantista



Associação Esperantista do Rio de Janeiro


Rua Teófilo Otoni, 135 / 302
telefone: 2467-4296

 aerjrj@hotmail.com
disvastigo.aerj@gmail.com

 www.aerj.org.br

 facebook.com/aerj.esperanto



 youtube.com/user/TVaerj



Rio Esperantista

Informativo da Associação Esperantista do Estado do Rio de Janeiro

Edição quadrimestral setembro – dezembro / 2010



Enhavo

El la Redakcio	_____	3
Babilado kun Katalin Kováts	_____	4
Literaturo: Du libroj		
“Ivan la sesa”	_____	9
Forgesito? Neniam plu!	_____	11
Vojaĝo (Tattjana Loskutova)		
Rememoroj aperas...	_____	13
Raporto	_____	17

Karaj legantoj,

Ĉi-foje vi trovos magran numeron de **Rio Esperantista**: malmultaj, sed ne malgravaj tekstoj, el kiuj certe vi povos multon lerni kaj ĝui. Kial tio? Ĉar ĝenerale ne estas dum la monatoj Januaro kaj Februaro, esperantaj eventoj, renkontiĝoj, ktp. Pro la jarfinaj festoj kaj Karnavalo, multaj uloj ferias, vojaĝas, disiĝas el ĉio, inkluzive de nia lingvo kaj movado.

Do, ĉiam okazas la samo: ni ne havas novaĵojn por enrevuigi. Tamen, tio donas al ni oportunon publikigi pli longajn tekstojn, kiujn ĝenerale ni, en alimonataj numeroj, devus dividi. Tio estas la okazo de la bo-ne-ga priskribo de nia rusa instruistino Tatjana Lostukova – ĉu vi ne memoras pri ŝi? Legu la tekston! – pri sia vojaĝo al Brazilo en la jaro 2015. Se diris Caetano, ke "Narciso acha feio o que não é espelho", vi certe trovos almenaŭ amuze vidi vin laŭ la reflekto de Tatjana, kiu bone sciis speguli siajn travivaĵojn en nia lando.

Aldone vi trovos ankaŭ longan kaj eksplodigan intervjuon kun persono tutmonde (laŭ esperantista skalo) konata: Katalin Kováts! La ĉionfarantino de edukado.net parolas al ni pri diversaj (kelkfoje vere tiklaj) demandoj rilataj al la nuna situacio de la Esperanto-instruado.



Tamen, ĉar ŝi ankaŭ faras arton kun vitro, diversaj el ŝiaj artaĵoj briligos nian numeron en diversaj lokoj.

Vi trovos tamen tekston pri gravega verko de la esperantlingva literaturo: la libro *Ivan la Sesa*, de Geraldo Mattos, reeldonita de AERĴ, kune kun la eldonejo Libro-Mondo, el Lublin, Pollando. Danke al tio, la libro disponeblas samtempe en Eŭropo kaj en Brazilo (kie ĝi kostas pli ol duono de la eŭropa prezo!).

Kaj ankoraŭ pri libroj, vi ion scios pri alia nova faro de AERĴ: reeldonado de *Ama Stelaro*, la unua esperanta libro verkita de brazilano.

Bonan legadon!

Fernando Pita

Rio Esperantista: La nomo Katalin Kováts estas kutime asociita kun la retejo edukado.net, kaj kun la KER-Ekzamenoj, tre gravaj por Esperantujo. Sed supozeble vi ne estis paraŝutita tien, certe estis (sufiĉe longa) vojo kiu vin kondukis tien. Rakontu al ni kiu estis tiu vojo? Kiu estis KK antaŭ edukado.net?

Katalin Kováts: Origine mi estas instruisto de la rusa lingvo kaj matematiko, pli poste mi akiris du aliajn diplomojn pri instruado de Esperanto kaj de la itala lingvo. Inter la jaroj 1986 kaj 2001 mi laboris en pedagogia altlernejo en Hungario, kie mi instruis la rusan kaj la italan lingvojn, ankaŭ trejnis instruistojn pri tiuj lingvoj. En tiu lernejo mi fondis kaj gvidis ankaŭ Esperanto-fakon kaj laboris en la katedro pri aplika lingvistiko. Mi doktoriĝis pri la propedeŭtika valoro de Esperanto. En 2001 mi transloĝiĝis al Nederlando, kie mi tiam kreis kaj ĝis nun gvidas la retejon edukado.net.

RE: Krom edukado.net, vi ankaŭ gvidas la “Instruistan Trejnadon” (unuajara kurso por instruistoj de Esperanto okazanta ĉiun trian jaron en la Universitato Adam Mickiewicz, en Poznano). Diru, kiagrade oni bezonas ke niaj volontulaj instruantoj – en Esperanto-kluboj, lernejoj ktp – havu profesian trejnadon?

KK: Krom la laboro en edukado.net, kie mi pretigas kaj disponigas instruhelpilojn kaj gvidas retan instruistan trejnadon (RITE), mi ofte vojaĝas al aranĝoj kaj gvidas ankaŭ ĉeestajn trejnadojn. Tiel okazas ankaŭ en Poznan, kadre de la Interlingvistikaj Studoj. Mi opinias tiun laboron tre grava, ĉar ne veras, ke kiu ajn, kiu regas nian lingvon, kapablas



ankaŭ instrui ĝin. Estas granda la respondeco de tiuj, kiuj instruas Esperanton, ĉar per malbone farita laboro oni povas damaĝi, forpreni la emon de la lernantoj. Krome instrui fuŝan Esperanton ankaŭ havus malbonajn konsekvencojn. Instrui lingvon estas fako, sekve oni devas lerni ĝin por bone majstri tiun arton. Tial necesas, ke ekzistu ebloj spertiĝi, kaj oni povu profiti el tiaj ebloj kiel eble plejmulte, por ke la instruado de Esperanto okazu inter bonaj kondiĉoj kaj sub la gvido de “fakuloj”.

“ Instrui lingvon estas fako, sekve oni devas lerni ĝin por bone majstri tiun arton

”

RE: *Kompletigante la antaŭan demandon: ĉu vi kredas, ke la lernantoj devas pagi la kursojn, aŭ, kiel kutime en diversaj lokoj, ke la kursoj daŭre restu senpagaj?*

KK: Esperanto havas grandan valoron. Se ni transdonas ĝin sen rekompenco, ni senvalorigas ĝin. Oni ne aprecas aferojn, por kiuj oni nenion devas doni aŭ oferti. Tial, eĉ

se malmulte, oni jes ja pagu por la kursoj de Esperanto kaj por la libroj el kiuj oni lernas ĝin. Komprenoble imageblas multaj aliaj manieroj de “pago”, ne nur mona, sed tion la koncernuloj mem devas inventi.

RE: *Vi ankaŭ kunordigas la KER-ekzamenojn tra la tuta mondo, ĉu ne? Tamen, lastatempe, oni aŭdas pri kelkaj problemoj inter vi kaj UEA, rilate la daŭrigon de KER-ekzamenoj. Kion vi povas diri al ni pri tio. (La demando ja estas tikla, tamen ĝi vere gravas ĉar, en kelkaj landoj, ekzemple Brazilo, KER-ekzamenoj fariĝis, manke de alia, la nura ekzamena sistemo disponebla al esperantistoj.)*

KK: Mi jam de 10 jaroj laboras por la KER-ekzamenoj. Ili kreiĝis grandparte danke al mia laboro, kaj ankaŭ la efektiva organizado kaj ekzamenado disvolviĝis kadre de edukado.net. La ekzamenoj apartenas al UEA kaj al la hungara ekzamencentro ORIGO, sed fakte estis mi, kiu laboris por ili “volontule”. La nova ĝenerala direktoro volas pli detale kontroli ankaŭ la KER-aferojn, do, volas enkonduki ŝanĝojn. Reage al tio, mi mem, se oni volas ke mi daŭrigu tiun



laboron, volas havi kontrakton kaj klaran difinon de la taskoj kaj laborkondiĉoj. Tiu transiro okazas ĝuste nuntempe, iom tamen longdaŭre, kaj pro tio estis stagnoj en mia laboro. Por mi gravas la klareco, ĉar pluraj en Esperantujo havas falsan bildon pri mia agado, kaj erare

penzas, ke mi finance profitis el la ekzamenoj. Ekzemple ankaŭ via samlandano, Carlos Correa, publike akuzis min per tiaĵo. Ne, mi nur laboregis, sed finance ĉiu enkasigita groŝo iris al UEA. UEA pagas al Budapeŝto altan sumon por la ekzamenoj, egalajn kotizojn por ĉiu kandidato, sendepende de ties devenlando, tiel ofte ĝi devas kompletigi la ekzamenkotizojn.

Ekzemple faris tion por brazilanoj, kiuj pagis signife malpli ol ilia ekzameno kostis ĉe Budapeŝto. Do, la afero estas tre komplika kaj kompleksa, por doni realan bildon kaj komprenigi ĉion, necesus verki dekojn da paĝoj, kion ne ebligas tiu ĉi intervjuo.

RE: Oni ja scias ke organizado de

KER-ekzamenoj estas ja peniga laborado, tamen, ĉu la penado valoras? Ĉu, post tiom da jaroj, la rezultoj ĝis nun atingitaj de KER-ekzameno montras sufiĉe klaran portreton de la lingvoscio de la esperantistoj?

KK: Dum la pasintaj 8 plenaj jaroj sukcese ekzameniĝis 1851 personoj, inter ili 222 brazilanoj. Ni ne scias kion respondi, kiam oni demandas nin pri tio, kiom da esperantistoj estas en la mondo. Sed ni scias, ke preskaŭ 2000 jam trapasis seriozan kaj prestiĝan ekzamenon, agnoskitan de ŝtataj instancoj, organizitan laŭ la normoj de la Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo. Per nia KER-sistemo kaj kun tiom da sukcesintoj ni pravas, ke Esperanto estas serioza lingvo, ĝiaj parolantoj estas ne hobia asocio, sed homoj kun lingvoscio, konscio, kulturo kaj historio. Kompreneble tiuj, kiuj trapasis ekzamenon antaŭe serioze studis, kaj tiel altiĝis ankaŭ la ĝenerala lingvonivelo de la esperantistaro.

RE: Nun vi lanĉis novan projekton “Ekparolu!”, kiu celas al tiu amaso da lernantoj, kiuj ekkonas Esperanton pere de Duolingo, ĉu



ne? Ĉu ion vi povas diri pri ĝi al ni? Kion vi pensas, kiel tiuj duolinganoj povas partopreni en la Esperanto-movado?

KK: Post malpli ol dujara funkciado la Duolingo-kursoj (angla kaj hispana) por Esperanto ekhavas milionon da lernantoj. Tiom da homoj aliĝis al la kursoj, kaj nuntempe tage ĉ. 100 personoj finas la arbon, t.e. akiras bonan bazan nivelon en Esperanto. La tasko de la movado estas trovi ilin, allogi ilin al la komunumo, zorgi pri tio, ke tiuj interesitoj daŭrigu sian studadon. Grupoj en Facebook multe zorgas pri ilia ensociigo. Edukado.net volas doni al ili eblon ankaŭ parole uzi la lingvon, kaj tiucele ni trejnas onklojn (spertajn esperantistojn), kiuj pretos doni liberajn parolsesiojn al la genevoj (komencintoj). Por partopreni en la projekto kaj la genevoj kaj la geonkloj devas trapasi ekzamenojn, kaj post tio, laŭ agendo, trovas unu la alian kaj interkomunikiĝas. La genevoj rajtas havi 10 senpagajn lecionojn. Jam


post du monatoj de la lanĉo ni havas 50 genevojn kaj 40 onklojn el 27 landoj, kaj okazigis preskaŭ 200 parolsesiojn. El Brazilo ni havas 1 onklon kaj 8 genevojn, el kiuj unu jam finis siajn studojn.

ekparolu

RE: Post tiom da movadaĵoj, estus interese se niaj legantoj povus ion scii pri viaj “artaĵoj”. Vi vere interesiĝas pri farado de juveloj, ĉu ne? Tamen, ĉu vi fasonas ilin, aŭ ĉu vi partoprenas ĉiujn fazojn de ilia fabrikado?

KK: Kutime oni ne demandas min en Esperanto-intervjuo pri mia arta laboro, sed en pli kaj pli da Esperanto-aranĝoj oni vidas miajn vitroartaĵojn, eĉ aĉetas ilin. Laborante de jardeko nur malantaŭ la komputilo mi bezonis alian okupon,





Kelkaj el la juveloj faritaj de K. Kováts

alian agadon, iom da ripozo, iom da alitipa kreiva laboro. Tiel post longa labortago por Esperanto mi kelkfoje premias min per nokta vitrumado, kaj farante vitrajn juvelojn mi ofte ekhavas bonajn ideojn ankaŭ por mia movada laboro. Mi lernis krei vitroperlojn, kapablas fari vitralojn, aplikas ankaŭ Tiffany-teknikon kaj jes ja ĉiujn fazojn de tiuj laboroj mi mem faras en mia hejme kreita ateliero liberigante mian fantazion kaj kreemon. La artaĵoj, naskiĝintaj en miaj manoj donas grandajn feliĉojn kaj kuraĝigojn.

Kvankam mia entrepreno “Juvelina” neniam fariĝos tiom vaste konata kiom edukado.net estas, ĝi finance kontribuas al tio, ke mi povu dediĉi min al la Esperanto-movado, kie mi faras multajn volontulajn laborojn.

Membrigu en AERĴ por 2017 kaj subtenu la e-movadon en Rio-de-Janeiro

Aligo ĉe aerj.org.br/associe-se | Informoj ĉe divastigo.aerj@gmail.com

<p>Rio Esperantista Senneĝa Kristnasko, ĉu eblas tio? Fernando 170</p>	<p>Rio Esperantista Kaj Tamen Ni Sukcesist! Fernando 110</p>	<p>Rio Esperantista Divastigado de Esperanto en Grandaj Eventoj Rafael Zerbatto</p>	<p>Rio Esperantista La legendo farĝas fakto Fabricio Possobon</p>	<p>Rio Esperantista Belas simpleco, simplas beleco Halina Salamon (Poezia Antologio)</p>	<p>Rio Esperantista Frenhez de Souza Kunitzke</p>	<p>Rio Esperantista HEROL DE ESP Ni priparnas la mondon!</p>	<p>Rio Esperantista El Gallego: Babilado kaj Poezia Angulo kun Suso Molinos</p>								
<p>Omago Gerardo Fonto</p>	<p>Babilado kun... Paulo Sergio Costa</p>	<p>Omago Jorge Campos</p>	<p>Babilado kun... Nazara Lancia</p>	<p>Post semado, venu rikolado!</p>	<p>Projekto Esperanto de "Bismat"</p>	<p>La legendo farĝas fakto</p>	<p>Babilado kun... Fabricio Possobon</p>	<p>30 Falaj Amikoj en Esperanto</p>	<p>Babilado kun... Alexandre Raymond</p>	<p>Babilado kun... Suzana Kunitzke</p>	<p>Faktoj pluvokovrimo de furgaŝta aĵoj</p>	<p>Rikolto por ĉiuj sekonoj</p>	<p>Geografiaj nomoj en Esperanto</p>	<p>El Gallego: Babilado kaj Poezia Angulo kun Suso Molinos</p>	<p>Sciencoj: Alvo multaj, alvo multaj, alvo multaj</p>

“Ivan la Sesa”: la vera esperanta literaturo kiu disvolvos viajn lingvokonojn

Fernando Pita

Ĉu pro facila alireblo, ĉu ĉar ili jam konas la libron – aŭ eĉ ĝin legis nacilingve – mi rajtas supozi, ke kiam iu volas studi – aŭ almenaŭ legi – originalan esperantan literaturon, tiu komencas per la verkoj eldonitaj en sia propra lando. Kaj do pli lertaj legantoj rapide perceptas unu el la mal(kom)fortaj trajtoj de la originala esperanta literaturo: la fakto ke, eĉ en bonaj aŭtoroj, eblas ofte rimarki ke, kvankam la teksto estas esperanta, la temo mem povus esti senprobleme verkita en ajna nacia lingvo. Pri kelkaj el ili oni povas eĉ sin demandi ĉu ili ne estis ja verkitaj nacilingve kaj tradukitaj esperanten, eble de la aŭtoro mem.


Trapasante tiun vere komencan fazon en kiu oni ĝenerale nur legas tradukojn kaj vere tekstojn "en facila lingvo taŭga por komencantoj", la legemulo serĉas tion, kion oni ja povas taksi la "elstaraj verkoj" de esperantistoj de sia lando, tiuj kiuj estas ĉiam menciataj de esperantistoj (brazilanoj aŭ ne).

Pro tio mia granda surprizo – kiam mi serĉis esperantajn verkojn de brazilanoj – ne trovi tiajn verkojn. Ĉu ili ne ekzistas? Ĉu Brazilo neniam produktis, en Esperanto, ion

rimarkindan? Jen kio kaŭzis mian personan serĉon pri la brazila esperanta literaturo... kaj jen alia surprizo! Oni ja havis aron de grandiozaj verkoj! Aro malgranda, fakte, sed proporcie granda konsiderante la kvanton da brazilaj esperantistoj.

Inter tiuj verkoj, unu atentigis min, pro la fakto ke, unuafoje en brazila esperantlingva verkaro, estis libro kies beletra kvalito paralelas nur kun la fakto ke ĝi neniel povus esti verkita nacilingve. Pri kiu

verko mi parolas? Pri *Ivan la Sesa*, de Geraldo Mattos, libro kiu, unuafoje eldonita de KKE en 1953, ĵus havis sian duan eldonon dank'al la afabla permeso de liaj gefiloj kaj per akordo inter AERĴ kaj Eldonejo Libro-Mondo, el Swidnik (Pollando), kiu kundividis kun ni la kostojn pri eldonado, kaj pro tio disdonas la libron en Eŭropo. (Kaj ĝuste pro tio,



Informplena kovrilo de la 1a eldono.

la libro kostas, ĉe ni, duonon ol ĉe UEA...)

Tiu verko estas ja esperanta originalaĵo, ne nur ĉar ĝi estas en norma Esperanta lingvo, sed ankaŭ pro tio ke la kompleta *nebrazilaneco* de ĝia temaro (iom obskura fakto de la rusa historio) kaj ĝia teatra strukturo – kvinakta vers-dramo – rara eĉ en la drama tradicio tute malpermesas ke ĝi estus verkita nacilingve. Ne! Tute ne! Tiu, kiu legos ĝin, havos antaŭ la okuloj tekston verkitan en bona kaj vera Esperanto, ĉar ĝi ne povus ekzisti aliel.

Malfeliĉe, tiu verko suferas de la granda antaŭjuĝo de esperantistoj kontraŭ sia propra kulturo: “ĝi estas teatraĵo, kaj personoj ne ŝatas tion...”; “ĝi estas en versoj, kaj personoj ne aĉetas poemojn”... Vidu, kara leganto, *Romeo kaj Ĵulieta* estas teatraĵo, kaj la tuta verkaro de Fernando Pessoa, Vinicius de Moraes, Carlos Drummond de Andrade kaj aliaj estas poeziforma... Do, kial tia sinteno kontraŭ bonaj verkoj, pro ilia formo? Laŭ mi, tio nur povas signifi unu aferon: romanoj kaj prozaĵoj “en facila

lingvo” estas pli facile vendeblaj. Do estas interese distrumpeti kontraŭ aliaj formoj de beletro, kiuj ne kunportos rapidan profiton... Sed kiuj same ne alportas kreskadon – ĉu lingva, ĉu kultura - al la leganto. Kaj, ni estu sinceraj, tio tute ne estas literatura valoro.

Ivan la Sesa estas ja avangarda verko, skribita antaŭ sia vera tempo, kiu devas esti konata de ĉiuj, kiuj serioze sin dediĉas al la plibonigo de siaj scioj kaj en la lingvo Esperanto, kaj en la esperanta kulturo. Jes, sed ĝi tute ne estas avangardeca laŭ la senco ke ĝi estas nenecese komplika, nek ke ĝi estas plenplena de neologismoj aŭ de novigoj – la aŭtoro estis prezidanto de la Akademio de Esperanto,

do, tre fundamentisma homo! –, kontraŭe al tio, kion oni povus unuavide pensi, la teksto de *Ivan la Sesa* estas vere facile legebla, kaj ĝi dolĉe elfluos dum la plezuraj, trankvilaj kaj ĝuindaj momentoj kiujn, vi dediĉos al tio. Kaj, ion mi povas aserti al vi: post kiam vi legos tiun libron, viaj konoj, kaj de Esperanto, kaj de la esperanta kulturo, neniam plu estos la samaj.



Forgesito? Neniam plu!!!

Fernando Pita

Tiu, kiu akompanas **Rio Esperantista** (jes, mi ŝatas pensi, ke tiu persono ekzistas), eble legis, antaŭ kelkaj numeroj, tekston nomitan "Fatala pseŭdonimo de forgesita aŭtoro", en kiu mi skribis pri la destino de libro trovita inter la donitaĵoj de Niteroja Esperanto-Klubo.

Tiu libro estas la unua verkita de brazilano, kaj tio estas jam grava malkovro, ĉar mi mem ĉiam pensis, ke tiu posteno apartenis al *Veterano?*, de Ismael Gomes Braga. Bone, la teksto estis publikigita, kaj poste republikigita en *Brazila Esperantisto*, tamen, kaj la libro mem?


Ĉu ne indus ke brazilaj – kaj alilandaj – esperantistoj, pli ol koni *pri* la libro, konus la libron mem? Ĉu ne estus interese ke tiu verk(et)o estus denove disponebla al la *esperanta* legantaro? Bone, mi estas libromaniulo,

pro tio, antaŭ ol ion decidi, mi iom babilis kun amikoj, neesperantistoj, por ke oni povu kune taksii la efektiveblecon de la situacio... kaj oni konkludis ke... Jes!!! Tiu libro devus esti reeldonita!

Tamen, jen envenis praktikaj demandoj: kiel tion fari? Kie kaj kiel trovi la necesajn ŝolvojn por la eldonaj problemoj? Post iom da cerbumado, oni decidis peti al esperantistoj mem kontribui por eldonado de la verko, sed kiom da mono personoj povus kontribui, en tiom suferigaj postpuĉaj tempoj? Oni rapide pensis ĉu ĉiu povus kontribui per 3 ekzempleroj (laŭ fabrikad-prezo) kaj, ricevinte nur unu el la tri, “donaci” al AERĴ la du aliajn, por ke ili estu disvendotaj al aliaj interesitoj.

Dirite, farite. Kaj jen denove *Ama Stelaro* ĉe ni, por ke Nuno Baena, nia unua esperanto-verkisto neniam plu estos “la forgesito”.

Fine, se tiamaniere oni reldonis *Ama Stelaro*, sammaniere oni planas prezenti al la esperantistoj (el AERĴ kaj aliaj institucioj) novajn titolojn por nia legado kaj bretaro. Sed pri tio oni pli detale parolos dum la venonta Ŝtata Renkontiĝo, en Meskito (Mesquita). Interesitoj nepre ĉeestu!



Amikoj, de la 31-a de aŭgusto ĝis la 10-a de septembro AERĴ denove partoprenos la Internacian Bienalon de Libro de Rio-de-Janeiro. Tamen, ni bezonas vian helpon... personan! Se vi povas bone komunikiĝi kun la ĝenerala publiko kaj bone kapablas informi pri Esperanto, kaj povas disponigi kelkajn tagojn por tion

fari, ni petas ke vi kunlaboru kun ni, deĵorante en nia budo. Kontakto nin en AERĴ, ĝis la 20-a de Majo, kiam okazos nia ŝtata renkontiĝo per la retpoŝto maratonoj@yahoo.com.br aŭ disvastigo.aerj@gmail.com.



Tatjana Loskutova, Ivanovo, Rusio

Sidante hejme ĉe la komputilo kaj rigardante transfenestre, kie kuŝas la neĝo kaj ekstera temperaturo malaltiĝis ĝis -30 gradoj (ja vera vintro venis al Rusio!), mi certgrade nostalgias pri varmaj landoj, kiujn mi vizitis kaj kie neniam oni surmetas varmajn vestaĵojn...

Pasis du jaroj de post mia vizito al Brazilo, tamen freŝas ĝis nun rememoroj pri la alisfera enigma por mi lando.

Ĉi artikolo ne pretendas al speciala originaleco: tial, ke vojaĝo al Brazilo estis unuafoja por mi, mi traveturis la plej popularajn lokojn, kaj apenaŭ mi rakontos ion novan kaj tre utilan en nia interreta jarcento.

Mia emo viziti Brazilon ekĝermis en malproksima 1981 jaro, kiam en ĝia ĉefurbo okazis la 66a UK. Evidente, ankaŭ kelkaj miaj E-samlandoj ekrevetis tiam veturi al Brazilo: ĝuste tiuepoke aperis E-traduko de la kanto “Amazonka” de S.Vajnblat (konata sur la tuta postsovetia teritorio esperantisto el Odeso, Ukrainio), kiun pasie oni kantas ĝis nun dum E-aranĝoj en Rusio: “...*Mi ankaŭ volas al Brazil', al malproksima land'.*” ... (https://youtu.be/sSahy_HhQDM)

Ideo veturi al Brazilo pli kaj pli “fermentis” dum la lastaj jaroj, kiam ni, rusianoj, ekhavis pli facilan



eniron al multaj landoj. Kaj kelkaj nialandaj E-kuraĝuloj jam efektivigis ĉi-direktan vojaĝon. De komenco rigardinte la mapon de la Suda Ameriko mi ne malakceptis viziti pornelonge ankaŭ iun najbaran landon (se mi planas flugi tiom malproksime, kial ne?), sed pripensinte, mi decidis konatiĝi nur kun Brazilo, ol febre galopi tra ceteraj landoj. Pluse, Brazilo estas grandega lando kaj ekvidi multon mi apenaŭ sukcesus dum mia 20-taga januara ferio. Finrezulte, mi ekplanis vizitojn al urboj São Paulo, Santos kaj Rio de Janeiro, kiuj troviĝas relative proksime unu al alia. Do, mi ekmesaĝis al lokaj geesperantistoj. La respondoj venis senprokraste : afablaj brazilaj gesamideanoj pretis ne nur renkonti min en flughaveno kaj ĉe busstacidomoj, akompani tra urboj, sed ankaŭ gastigi min en siaj


hejmoj, pro kio mi estis tre dankema. La lasta nuanco estis tre konvena pro neatendita ekonomia krizo: aĉetinte flugbileton oktobre al la plej multekosta lando de la Suda Ameriko oni apenaŭ povis imagi situacion, kiun trafis nia lando decembre 2014...

San-Paŭlo

Matene post nokta senaventura 12-hora flugo el Eŭropo en la plej granda aerhaveno de Suda Ameriko Guarulhos en San-Paŭlo min renkontas E-paro, tiama prezidanto de la ŝtata E-asocio José Roberto Tenório da Silva kun sia edzino, kaj ni veturas al la sidejo de la asocio. Unuetaĝa domo kun kelkaj ĉambroj (kunvenejoj, librovendejo, biblioteko, klasĉambro, kelkaj aliaj mastrumaj ejoj) teretaĝe kaj kelesaloneto kun ≈ 50 sidlokoj kaj tribunon lasas ege pozitivan impreson pri serioza E-laboro, kiu estas farata ĉi-tie. La domo, perfekte prizorgata

unuavice de la prezidanto, fervora esperantisto bonnivele parolanta, eldonfasonisto laŭprofesie, estas proprietaĵo de la E-asocio. Vere, José Roberto bedaŭras, ke kvanto de asociaj membroj falas, kaj li konscias pri neceso pli intense agadi por altigi ĝin.

Por tagmanĝi ni iras trioje al proksima restoracio simila al grandega mempriserva manĝejo. Tion, kion mi vidis tie, bezonas specialan priskribon. Neniam kaj nenie antaŭe mi spertis ion saman: oni vendas diverspecajn manĝaĵojn pokilogramme! Ĉe enirejo vi ricevas malplenan fakturon. Apudas stoko de egalampleksaj teleroj, sufiĉe grandaj. Poste vi elektas manĝojn laŭguste kaj laŭplaĉe: salatojn, fiŝaĵojn, viandaĵojn, garnirojn, fruktojn, legomojn ktp. La unuan fojon oni ŝatus perokule gustumi ĉion: tiom abundas elekto parte de nekonataj manĝoj, kaj ĉio estas



La urbo San-Paŭlo dum vespero

apetitveka. Ne mankas baza manĝo de brazilanoj, t.e. rizo kun ruĝaj (kutime) fazeoloj. Kun plenigita telero vi proksimiĝas al oficisto, kiu pesas vian teleron kaj enskribas sumon en vian fakturon. Se vi deziras ion trinki, mendu aldone ĉe kelnero.

Mi planis 6-tagan restadon en San-Paŭlo kaj tamen supozis, ke eble estas iom tro da tagoj por viziti la plej grandan brazilan urbon, kie apudas malnovaj malaltaj domoj kaj modernaj ĉiel-skrapuloj, sur-deklivaj malriĉaj kvartaloj kaj pompa urbocentro

plenplena je oficejoj de diversaj entreprenoj, margenuloj kaj bonfartuloj, kaj kies loĝantaro superas 10 milionojn. Tial, ankoraŭ aŭtune mi petis helpon ĉe José R. Tenório da Silva okazigi viziton al lokaj fajrobrigadistoj. Evidentiĝis, ke tio estas ebla kaj eĉ interesa ankaŭ por fajroestingistoj. Ĉi-tie mi ne priksribu tion, kio rezultigis el mia ideo (supozeble, iu el vi trovos ĝin iom stranga), ĉar pri nia vizito jam verkis artikolon la prezidanto de la

E-asocio kaj resumis ĝin Fabricio Valle, tiama redaktoro de la revuo «Esperanto» de UEA, en ĝia marta 2015 numero (paĝo 58).

Dum aliaj tagoj ne mankis vizitoj al urbaj vidindaĵoj akompane de alia loka E-aktivulino Aparecida de

Souza Araújo, estraranino de la asocio. Aparte menciindas veturoj (senpagaj por pensiuloj, eĉ eksterlandaj: sufiĉas prezenti identigilan dokumenton) per metroo kun vastegaj haloj kaj larĝaj vagonoj. Konstruita proksimume antaŭ 40 jaroj ĝi konsiderinde malŝarĝis

urban trafikon. En ceteraj stacioj en centro de la urbo oni antaŭvidis platformojn de ambaŭ flankoj de vagonoj: kiam alvenas metrotrajno, oni forlasas vagonon tra pordoj de unu flanko, kaj nur post tio estas malfermataj pordoj de alia flanko por enlasi novajn pasaĝerojn. Iun tagon ni atingas ĉefan bazaron, en kiu estas vendataj fruktoj (multekostegaj en tiu-ĉi tropika lando!): kelkaj el ili kreskas nur en Sud-Ameriko. Feliĉe, bonkoraj brazilaj



Tatjana dum vizito al la fajrobrigadistoj

vendistoj proponas senpage gustumi raraĵojn kaj ne insistas pri ilia aĉeto.

Santos

Posttagmeze januare pluvas en San-Paŭlo, kaj de tempo al tempo la akvo inundas kelkajn partojn de la urbo. Sed en la apuda Santos la ĉielo estas sennuba kaj brilegas hela sun'. Mi atingis tiun-ĉi ĉeoceanan urbon per komforta buso. Iujn momentojn la buso apenaŭ antaŭeniĝis laŭ dukoridora ŝoseo pro kamionoj, kiuj veturigas diversajn kargojn al marhaveno de Santos. Dum 1,5 hora veturo mi ege frostiĝis. Tiomgrade mi ne frostas eĉ en vintra Rusio: klimatiziloj funkcias perfekte en Brazilo! Detalan artikolon pri "Klimatizado en brazilaj publikaj transportiloj" verkis aŭstra esperantisto Anton Oberndorfer, kiu samtempe kun mi vizitis Brazilon (<https://goo.gl/5mg9kW>).

Krom promenoj tra la varmega urbo en kompanio de kelkaj geesperantistoj, komunaj vespermanĝoj, vizitoj al plaĝo, vidindaĵoj kaj al altaĵo, de kiu paraglisadumis lokaj aventuruloj, ŝipekskurso laŭ la Atlantiko prezentigis okazo veturi al bieno de la familio Mendes,

ĉe kiu mi gastis. Multaj rusianoj bone memoras brazilajn filmoseriojn el 90-aj jaroj, unuaj "post-perestrojkaj" jaroj. Tiam tiuj-ĉi filmoj inundis niajn televidekranojn. Ĝuste tiutempe rusiaj civitanoj konatiĝis kun la vorto "fazendo", kiun oni longtempe aplikadis al siaj eksterurbaj bienetoj. La veraj brazilaj "fazendoj" troviĝas sufiĉe for de urboj kaj ofte en kamparo aŭ tropika arbaro. Nuntempe iliaj posedantoj havas tie plenkomfortajn 1-2 – etaĝajn domojn. Sur bienaj teritorioj troviĝas ĝardenoj, legumejoj kaj bestejoj. La vizitita bieno, krom menciitaĵojn, enhavis vastan terenon kun palmoj kaj aliaj tropikaj kreskaĵoj, du artefaritajn lagetojn kun bredataj karpoj, kiujn fiŝkaptis la mastro Jose kaj kiujn poste fritis la mastrino Zilda. Freŝiga akvo el fonto sur deklivo senĉese plenigadis naĝejon, en kiu ni naĝis



La marbordo en Santos

savante nin de ŝvito sub senkompata suno...

Pasaĝera fervojo mankas en Brazilo. Tial mi denove veturas perbuse. La vojaĝo inter Santos kaj Rio de Ĵanejro daŭras 8 horojn, sed postfenestra pejzaĝo estas iom enua, ne tiel pitoreska, kiel mi ŝatus vidi dum taga veturo. Mezvoje la buso

faras duonhoran halton. Preskaŭ ĉiuj pasaĝeroj de la buso iras al stacia restoracio por tagmanĝi. Same mi sekvas ilin kaj denove konstatas pokilograman sistemon de priservado.

(Daŭrigo en Rio Esperantista 202)

Raporto

Riĉenhavaj “BEL-Konferencoj 2017” en Petropolo

Paŭlo Sergio Viana

La 14-an kaj la 15-an de aprilo 2017, okazis en la brazila urbo Petropolo (ŝtato Rio-de-Ĵanejro) unu plia eldono de la jam tradiciaj “BEL-Konferencoj”, sub la aŭspicio de Brazila Esperanto-Ligo kaj organizo de Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵanejro. Pli ol tridek atentaj kaj diskutemaj samideanoj el kvar brazilaj ŝtatoj ĉeestis dek prelegojn kaj vigle diskutis la koncernajn temojn. La evento okazis en la katolika institucio “Domo de Maria”, kie pluraj Esperantistoj tranoktis kaj kie ĉiuj manĝis tre bonan veganan manĝaĵon. La etoso estis amika, entuziasma kaj vigla, kaj la unua prelego estis omaĝo al Zamenhof, precize en la dato, cent jarojn post lia forpaso. La programo inkluzivis la jenajn prelegojn:




- Enkonduko fare de “rektoro” Paulo Nascentes, kiu aludis al la poezio de du gravaj latinamerikaj poetoj: “Poezia promenado kun Galeano kaj Neruda”.
- “La evoluo de la Zamenhofa Penso (M.Nazaré Laroca).

- “Meditado en la brazila sanpublika sistemo SUS” (Elmir S. Lima).
- “Malfacilaĵoj dum la tradukado de *Quincas Borga*” (Francisco Wechsler).
- “Abelo, insekto grava por la homaro” (Luiz Schanuel)
- “Esperanta Literaturo-Sumoo” (Dirce Sales).
- “Aldravio – kaj aliaj formoj de etaj poemoj” (Paulo S. Viana).
- “Ivan la Sesa kaj la limoj de la Esperanta literaturo (Fernando Pita).
- “Biblioteko, memoro, historio” (Néia L. Souza).
- “Parlamentara reĝimo en Brazilo – septembro 1961” (Márcio Santos).
- “Skizo pri sanitaraj servoj por media salubriĝo” (Allan Argolo).

Estis eldonita kaj senpage disdonita al ĉiuj partoprenantoj libreto, kiu enhavas la resumojn de ĉiuj prelegoj. Dum la tuta evento funkciis eta libroservo.

La proksimaj “BEL-Konferencoj 2018” okazos denove en la paskaj tagoj, en la urbo Juiz de Fora (ŝtato Minas Gerais).



Apude: Benedicto Silva kaj Paulo Nascentes.
Supre: 1) Enkonduko de Paulo Nascentes,
2) La petropolaj montoj, 3) Elokventa prelego de F. Wechsler, 4) Pecoj el la libroservo.



Informoj ĉe esperanto.org.br

campanha

ESPERANTO



NA **BIENAL
DO LIVRO
2017 RIO**



Participe e ajude novamente a divulgar o esperanto num dos maiores eventos culturais do Rio de Janeiro

Info: disvastigo.aerj@gmail.com

28^a Ŝtata Esperanto-Renkonto

de Rio-de-Janeiro

sabato, 20^a majo 2017



La **graveco**
de **literaturo**
en la esperanta mondo

Renkontejo:

Seminário Unido de Teologia de Mesquita – Travessa Libânia, 30 – Mesquita

Informoj kaj aliĝoj:
aerj.org.br/estadual